estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 183 Julio 2001

Laborantoj:


Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆



# Se mi estus ĉiopovulo

Estas homoj, kiuj scipovas fari diversajn aferojn, kiujn la aliaj homoj ne povas. Kelkaj povas antaŭvidi okazontaĵojn, aliaj povas kuraci diversajn malsanojn, kaj estas ankaŭ multaj aliaj diversaj specoj de specialaj kapabloj. Ni imagu, ke iam feino aperus, kiel en fabeloj, kaj petus ke ni diru tri dezirojn, kiujn ŝi vole plenumos.

Malfacila decido. Multaj homoj petus riĉecon, kredante ke per mono oni povas akiri ion ajn, aliaj nomus feliĉon, kaj aliaj multajn diversajn dezirindaĵojn. Kelkaj personoj versajne dezirus ion el jam menciitaj specialaj kapabloj aŭ povoj. Sed ĉu estus bone, se la feino plenumus tiajn dezirojn?

Foje mi pensis pri la kuracado de homoj. Kompreneble, mi ne estas kuracisto. Sed oni diras ke homoj, per diversaj tiel nomataj *okultaj metodoj*, povas akiri specialajn kapablojn, kaj inter ili, povon por resanigi.

Vere, ĉiam ekzistis homoj ekster la „ortodoksa medicino", kiuj praktikas alian specon de kuracado. Inter primitivaj popoloj tiuj estis nomitaj *ŝamanoj*, en aliaj kulturoj oni nomis ilin *popolaj kuracistoj*. Nuntempe ni ofte informiĝas pri *naturkuracistoj*, kiuj uzas diversajn plantojn kaj simplajn metodojn, ekzemple masaĝon aŭ tiel nomatan *bioenergion*.

Mi ne estas kompetenta juĝi pri tiaj aferoj. Nuntempa regula medicino, kvankam ofte kapabla fari multon por resanigi, ne povas ĉiam helpi la malsanulojn. Mi opinias, ke inter la jam menciitaj neortodoksaj kuracistoj ekzistas tiuj, kiuj povas kelkfoje per diversaj metodoj solvi problemojn de malsanuloj kiujn la regulaj kuracistoj ne povas.

Tamen eĉ ili ne povas ĉiam helpi. Ekzistas nekuraceblaj malsanoj, kaj certe ne ekzistas medikamento kontraŭ la morto.

Pro tio mi neniam sentis emon iĝi kuracisto, ĉu regula ĉu neregula, ĉar mi sciis, ke neniu metodo estas ĉiam sukcesoplena. Sed se la feino aperus, mi eble petus ŝin, ke ŝi donu al mi tiun povon per kiu mi povus forigi iun ajn malsanon.




Oni rakontas pri homoj el la historio, kiuj havis ŝajne senliman resanigpovon. Oni pensas ilin esti sanktuloj; kelkfoje oni diras, ke ili estas enkarniĝoj de Dio mem. Certe la plej konata el ili estas Jesuo, kiu kapablis eĉ revivigi la mortintojn. Ankaŭ nun vivas homo, kiu havas similan povon, sed ĉi tie mi ne mencias lian nomon, ĉar mi ne volas fari reklamon; krome mia informo estas nur onidiro. Do, ni supozu, ke povas ekzisti similaj homoj, kaj ke iuj povus akiri tiun senliman sanigpovon.

Ŝajnas, ke tiu estus bonega afero. Ĉiu el ni havas konatulojn, parencojn, geamikojn; ni havas tiujn personojn, kiujn ni ŝatas, kiujn ni amas. Kaj facile povus okazi, ke iu el ili havas gravan malsanon, kiun neniu kuracisto povas resanigi. Kia bonega afero estus se ni povus helpi. Kaj estas multegaj homoj kiuj suferas pro malsanoj. Tro ofte kuracisto, kvankam li faras ĉion laŭ sia scio, sukcesas nur plimildigi la malsanon kaj ne povas resanigi la pacienton. Ankaŭ estus okazoj, kiam malsanulo estas resanigebla sed ne havas monon por pagi la kuracadon. Kaj kazoj kiam la kuracistoj ne povas helpi, kaj la paciento mortas.

Se mi estus ĉiopovulo, mi povus helpi al ĉiuj malsanuloj. Eble komence mi helpus nur tiujn malsanulojn, kiuj troviĝus inter miaj konatuloj. Sed se mi sukcese resanigus ilin, eĉ se mi petus, ke neniu diru pri miaj agoj, iom post iom, pli kaj pli da homoj ekscius pri mi, ke mi povas multe helpi malsanulojn kaj ke mi ne atendas rekompencon. Estus ĝojplena afero. Kaj se mi iĝus kapabla helpi tiel, mi helpus ne nur tiujn homojn, kiujn mi ŝatas, sed mi kompatus ankaŭ miajn malamikojn. Savito de grava malsano transformiĝus el malamiko je amiko.

povas helpi la homojn, estus mirinda kaj ĝojplena, sed samtempe ankaŭ tre laciga. La malsanuloj, la homoj kiuj suferas pri iaj sanproblemoj, sencese venus al mi por peti helpon. Kaj kelkfoje mi devus nevole rifuzi ilin pro neceso iom ripozi.



Nun alvenas al mi alia grava demando. Helpi aliajn vere estas nobla kaj bona afero, sed ĉu tiu vere ĉiam dezirindas? Se mi povus redoni vivon al homoj, kiuj sen mi devus morti, el kompato mi farus tion. Sed ju pli da homoj atingus min, des pli da homoj ne plu mortus. Sed ĉu la morto, kvankam preskaŭ ĉiam malĝojiga, estas ĉiam malbona afero? Ĝi estas natura, kelkfoje bezonata evento. La homoj, kiuj vivas en fizika korpo, ĉiam mortas post iom da tempo, eĉ la homoj kiuj posedas miraklan kuracpovon. Pri la spirito de la homo oni asertas ke ĝi estas senmorta, sed pri fizika korpo neniu diras ke ĝi estas eterna.

Ĉu mi rajtus ŝanĝi la mondon, kiu malgraŭ ĉiuj problemoj de la homaro, ŝajnas bone funkcii. Vane mi estus ĉiopovulo, se mi ne estus samtempe ankaŭ ĉiosciulo. Nur tiel mi povus scii kion fari, elekti kiam mi devas resanigi la malsanulojn, kaj kiam ne. Se mi estus samtempe ĉiopovulo kaj ĉiosciulo, mi agus konforme al la planoj de Dio, mi estus ilo, per kio Dio agas en la mondo, aŭ iel mi mem similus al Dio.

Sed mi ne estas Dio, mi estas nur simpla homo. Tiu afero, pri kiu mi pensadis estus mirinda, nome, ke mi povus resanigi ĉiujn malsanulojn, sed iel ĝi tamen ne estus bona. Ĉiu homo havas sian propran sorton, ankaŭ la tuta mondo ŝajnas havi sian propran sorton. Ne estus bone, se iu el ni, ordinaraj homoj, povus laŭplaĉe ŝanĝi tiujn aferojn. Do, mi ne deziras esti ĉiopovulo; mi preferas resti nur ordinara homo, kaj fari nur tion, kion mi vere povas per miaj tute limigitaj povoj.

— SIMON Ladislaŭ, Oradea, Rumanio

## MI DEZIRAS AL VI SUFIĈE DA

Lastatempe ĉe flughaveno mi subaŭskultis patron kaj filinon dum iliaj lastaj kunmomentoj. Jam oni laŭtparole anoncis ŝian forflugon. Ili staris ĉe la elirejo nur por pasaĝeroj. Ili ĉirkaŭbrakumis, kaj li diris, „Mi amas vin. Mi deziras al vi sufiĉe da."

Ŝi respondis, „Paĉjo, nia vivo kune estis pli ol sufiĉe. Via amo estas ĉio kiun mi iam bezonis. Mi deziras ankaŭ al vi sufiĉe da, Paĉjo." Ili interŝanĝis kisojn, kaj ŝi foriris.

Li paŝis al la fenestro, kie mi sidis, kaj paŭzis. Estis evidente, ke li deziris kaj bezonis plori. Mi penis ne trudi min al lia privateco, sed li invitis min enen dirante, „Ĉu vi iam faris al iu adiaŭon, konsciante ke ĝi estas la lasta?" „Jes, mi faris," mi respondis. „Pardonu, ke mi demandas, sed kial la adiaŭo estas por ĉiam?" mi demandis.


„Mi estas maljuna, kaj ŝi loĝas tre malproksime. Mi devos fronti defiojn. La vero estas, ke ŝia sekva reveno estos por mia funebra ceremonio," li diris.

„Kiam vi adiaŭis, mi aŭdis vin diri, ‚Mi deziras al vi sufiĉe.' Ĉu mi rajtas demandi al vi pri la signifo?" Li komencis rideti. „Tiu estas esprimo heredigita de unu generacio al alia. Miaj gepatroj diris tiun al ĉiuj." Li momente paŭzis kaj rigardis supren, kvazaŭ li strebis detale memori, kaj li ridetis eĉ pli. „Kiam ni diris, ‚Mi deziras al vi sufiĉe da,' ni deziris ke la homo havu vivon plenigitan de nur sufiĉe da bonaj aferoj por subteni lin sed ne tro da," li daŭrigis, kaj direktante sin al mi, kvazaŭ li deklamis ion parkere lernitan, li dividis kun mi jen:

„Mi deziras al vi sufiĉe da suno por daŭrigi helan sintenon.

„Mi deziras al vi sufiĉe da pluvo, por ke vi pli valortaksu la sunon.

„Mi deziras al vi sufiĉe da feliĉo por daŭre vivigi vian animon.



„Mi deziras al vi sufiĉe da doloro, por ke la plej etaj ĝojoj de la vivo aspektos pli grandaj.

„Mi deziras al vi sufiĉe da profito por kontentigi vian esperon.

„Mi deziras al vi sufiĉe da malprofito por ke vi pli alte taksu tion kion vi posedas.

„Mi deziras al vi sufiĉe da salutoj por ebligi vin toleri la lastan adiaŭon."



Larmoj superfluis la okulojn, kaj li forpaŝis.

— Anonima en la reto (tradukis Steĉjo)

## PROVERBOJ

Ne povas ĉiu homo esti pap' en Romo. (Zamenhof)

Ĉiu tago ripetas al ni: esperu la neeblan, faru la eblan. (Goethe)

Finiĝinte la ludo, la reĝo kaj la peono reiras al la sama kesto. (Proverbo itala)

Kion oni volas, tion oni povas. (Zamenhof)